

& Oni malfermas la butikon:

< Ripete 22 sed rekante 11 el 43 batoj por strofo, entute 344 paŝoj dum 4 minutoj.
Verkis Raymond Schwartz (La stranga butiko, 1931). Baladigis Martin Strid (2017) per
svedaj melodio kaj rekantaĵo kaj disduigo na strofoj.>

(#Melodio:

<:41> (/do SooSolFa Mido LaLaLaSo La La;do Lado Tire dodoTiLa So So;do
SooSolFa Mido LaLaLaSo La La;do Lado Tire dododoTi do do;

(#Rekantaĵe: mi doodore miredomi re reTi So; La FaaFaSo LaSoFaLa SooSoMi Do)

(#Ripete: do SooSolFa Mido LaLaLaSo La La;do Lado Tire dodoTiLa do do)

)×8)+

(&Strofoj:

'1 /Ho sankta2 Muz', mistermaskita io, ;
Legendfigur' por pia fantazio, (':; Ne
kreda2s mi, ke ie vi ekzistas, ; Sed al la
tent' mi tamen ne rezistas)

(×:; **Hej hop faderio fade ra lade rej ;
Hej hop faderio faderala de rej)**

(,,:; Ne kreda2s mi, ke ie vi ekzistas, ;
Sed al la tent' mi tamen ne rezistas)

'2 Alvoki vin laŭ famaj pramodeloj. – ;
Kun aŭreol' de mistifik-mistiko ;
Alflugu do, estrino de l' pedeloj, ; Por
levi nun kurtenon de l' Butiko!

'3 "Hi hi! Ha ha! – Vi tro facile mokas,
; Sed vane min oni neniam vokas. ; Mi
venis, jen! – ho ne por vin inspiri, ;
Mallonge nur al vi mi volas diri,

'4 Ke via rim-malkara "poezio" ; Ne
estas art' kreita dum ekstazo, ; Ĉar via
task' konsistis nur el tio: ; Kolekti la...
sterkpomojn de l' Pegazo!

'5 Kaj – inter ni – ĉu iam simpla floro ;
Aŭ birdokant' vin tuŝis en la koro? ; La
noktospir' sub la ĉielkupolo ; Ne
ĉarmas vin; – vin logas nur petolo,

'6 Banala ŝerc' kaj dubesenca sprito. ;
Kaj tion ĉi... indulgas la kritiko! ;
Disiĝu ni kaj restu, laŭ merito, ; Mi sur
Parnas', vi... en spicistbutiko!"

'7 Severa Muz', – vi ŝutis malavare ;
Benvortojn sur hometon, kiu ŝpare ;
Misuzis vin ĝis nun sub sia plumo, ;
(Estonte li vin lasos en mallumo.)

'8 Sed tamen mi kun tre respektaj sentoj
; Koncedas, ke... ekzistas kaŭz' por
miri, ; Kaj por edifo de miaj geklientoj
; Necesis tion diri.)